

# STATUTO de ILEI-Catalunya (Kataluna Sekcio de ILEI)

(aprobata la 31an de oktobro 1999; reformita la 11an de junio 2017)

## Artikolo 1

### IDENTECO

1.1 La kompleta nomo de la organizo estas "ILEI-Catalunya (Kataluna Sekcio de ILEI)", mallonge "ILEI-Cat".

1.2 En la sekva teksto de tiu ĉi Statuto ĝi estas nomita "ILEI-Catalunya" aŭ "la Sekcio".

## Artikolo 2

### DIFINOJ

2.1 ILEI-Catalunya estas neprofitcela asocio fondita la 19an de decembro 1998 por nelimigita tempo.

2.2 Ĝi estas faka sekcio de Kataluna Esperanto-Asocio post aprobo de KEA, kaj submetiĝas al ties Statuto rilate rajtojn kaj devojn de sekcioj.

2.3 ILEI-Catalunya havas sian sidejon en Katalunio, agas en tiu teritorio kiel oficiala sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) laŭ decido de ĝia Komitato la 11an de aŭgusto 1999, kaj submetiĝas al ties Statuto kaj Interna Regularo rilate rajtojn kaj devojn de sekcioj kaj bazajn celojn kaj principojn.

2.4 La oficialaj lingvoj de la Sekcio estas la internacia lingvo Esperanto kaj la kataluna.

## Artikolo 3

### CELOJ

La celoj de ILEI-Catalunya estas:

3.1 Disvastigo kaj diskonigo de Esperanto en edukaj medioj.

3.2 Aplikado de Esperanto por internaciaj rilatoj kun edukaj celoj.

3.3 Disvastigo, plibonigo kaj kunordigo de oficiala kaj neoficiala instruado de Esperanto en katalunlingvaj medioj.

## Artikolo 4

### MEMBRECO

4.1 Ĉiu persono kiu okupiĝas aŭ interesiĝas pri edukado kaj instruado rajtas membriĝi; membriĝo estas libera kaj memvola.

4.2 Estas du klasoj de membroj:

a) Membroj pagantaj kotizon al ILEI ("internaciaj" membroj); el tiuj devas esti minimume kvin.

b) Membroj pagantaj kotizon al KEA kaj petintaj aliĝon al la Sekcio ("sekciaj" membroj)

4.3 Membreco validas por unu natura jaro kaj plilongiĝas per la sama periodo.

4.2 Fino de membreco okazas pro:

a) deziro de la membro skribe sciigita al la Sekretario;

b) kontraŭstatuta ago de la membro;

c) forpaso de la membro.

4.4 La membroj havas la rajtojn:

a) elekti, sin proponi kaj esti elektataj kiel estraranoj de la Sekcio kaj/aŭ komitatanoj ĉe Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ĝianome, sub la kondiĉoj kaj limigoj de la Statuto de ILEI;

b) partopreni ĉiujn kunsidojn de la Ĝenerala Asembleo;

c) ĉeesti la kunsidojn de la Estraro, post anonco;

ĉ) esti informataj pri la agoj koncernantaj la Sekcio;

d) starigi demandojn kaj doni konsilojn al la instancoj de la Sekcio;

e) kontroli la kontojn de la Sekcio, post anonco;

f) esti informataj pri la identeco de aliaj membroj.

4.5 La membroj havas la devojn:

a) pagi sian kotizon antaŭ la 1a de marto;

b) informi pri sia instruado aŭ neinstruado de Esperanto dum la pasinta jaro antaŭ la 1a de marto.

## Artikolo 5

### ORGANIZA STRUKTURO

La instancoj de ILEI-Catalunya estas:

5.1 la Estraro;

5.2 la Ĝenerala Asembleo.

#### LA ESTRARO

5.1.1 estas la gvida instanco de la Sekcio;

5.1.2 okaze de ekŝiĝo de unu aŭ pli da ĝiaj membroj rajtas dissolviĝi kaj organizi novan elekton; ĝiaj membroj estas reelekteblaj;

5.1.3 konsistas el la Sekciestro kaj minimume du kaj maksimume kvar aliaj membroj;

5.1.4 elektas el inter siaj membroj la komitatanojn kiuj reprezentos la Sekcion ĉe Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj; la Sekciestro povas esti komitatano;

5.1.5 kunsidas minimume unufoje jare, ĉu persone aŭ per videokonferenco;

5.1.6 decidas pri la konkreta nombro de ĝiaj membroj por la venontaj elektoj;

5.1.7 decidas pri la ĝusta interpreto de la artikoloj de la Statuto okaze de dubo;

5.1.8 rajtas decidi pri ĉiuj aferoj inter du kunsidoj de la Ĝenerala Asembleo;

5.1.9 rajtas organizi voĉdonadojn perpoŝte aŭ perrete;

5.1.10 raportas pri siaj agoj koncerne la celojn de la Sekcio kaj pri la financoj al ties Ĝenerala Asembleo;

5.1.11 sendas siajn kaj ricevitaĵajn proponojn kune kun la tagordo kaj la financa raporto al la Ĝenerala Asembleo minimume du semajnoj antaŭ la venonta asembleo;

5.1.12 en kazo de intertempa ekŝiĝo de estrarano, inkluzive de la Sekciestro, la ceteraj estraranoj respondecas pri daŭrigo de ties laboro ĝis la elekto de anstataŭanto, kiu finos la tri-jaran oficodaŭron aŭ ĝis la elekto de nova Estraro.

5.1.13 La Sekciestro:

a) kunvokas kaj prezidas la kunsidojn de la estraro kaj de la Ĝenerala Asembleo; se la Sekciestro ne ĉeestas kaj ne anstataŭigis sin, la aliaj estraranoj elektas la kunsid-estron inter si;

b) reprezentas la Sekcion en eksteraj rilatoj;

c) respondecas al la Ĝenerala Asembleo pri ĉiuj agoj de la Estraro koncerne la Sekcion;

ĉ) plenumas ĉiujn aliajn devojn laŭ la statuto de ILEI;

5.1.13 La ceteraj estraranoj dividas la taskojn inter si kaj zorgas pri entrepreno kaj ebla efektivigo de tiuj agoj kiuj povas servi al la celoj de la Sekcio laŭ decido de la Estraro.

#### LA ĜENERALA ASEMBLEO

5.2.1 konsistas el ĉiuj membroj de la Sekcio kaj estas ĝia supera decida instanco;

5.2.2 kunsidas minimume unufoje jare;

5.2.3 decidas pri minimume tri kvaronoj de la validaj voĉoj pri malfondo de la Sekcio. Tiukaze ties havaĵo estos donacita al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj;

5.2.4 decidas pri ŝanĝoj en la Statuto;

5.2.5 elektas la Sekciestron kaj la aliajn estraranojn por tri-jara oficodaŭro.

## Artikolo 6

### FINANCAJ RIMEDOJ

6.1 La financaj rimedoj de ILEI-Catalunya estas:

a) membrokotizo, kiuj devas esti pagitaj al la Kasisto antaŭ la fino de februaro;

b) donacoj aŭ subvencioj;

c) krompagoj de la membroj, decidotaj de la Ĝenerala Asembleo;

d) aliaj enspezoj.

6.2 ILEI-Cat faros interkonsenton kun KEA por ke parto de la membrokotizo de sekciaj membroj estu asignata al la celoj de ILEI-Cat.

6.3 ILEI-Cat povas en Ĝenerala Asembleo aldoni plian kotizon super la kotizo de ILEI aŭ KEA, ĉu por unu klaso de membroj, ĉu por ambaŭ.

## Artikolo 7

### LA ADMINISTRA JARO

La administra jaro egalas al la kalendara jaro.

## Artikolo 8

### VOĈDONO- KAJ ELEKTO-REGULARO

8.1 En kunsidoj, ĉeestanta membro povas reprezenti alia(j)n membro(j)n kiu(j) ne povas ĉeesti, kondiĉe ke tiu(j) alia(j) membro(j) skribe permesas tiun reprezenton. La ĉeestanta membro tiam havas la voĉo(j)n de la neĉeestanta(j).

8.2 Decidojn oni alprenas per simpla plimulto de validaj voĉoj de la ĉeestantoj kaj reprezentatoj (escepte en la kazo nomita en artikolo 5.2.3). Sindetenoj ne estas validaj voĉoj.

8.3 En kazo de egaleco de la validaj voĉoj decidas la Sekciestro aŭ ties reprezentanto.

8.4 Por elekti la estraron oni elektas unue kaj aparte la Sekciestron kaj poste la aliajn membrojn en komuna balotado.

8.5 Voĉdonadojn kaj elektojn povas esti organizataj perpoŝte aŭ perrete laŭ decido de la Estraro.

8.6 Kiam en elekto estas tiom da kandidatoj kiom elektotaj postenoj, tiuj kandidatoj estas aŭtomate elektataj.

8.7 Kворумo por ĉeestaj voĉdonoj de la Ĝenerala Asembleo estas unu dekono, minimume tri membroj.

8.8 Kворумo por perpoŝtaj aŭ interretaj voĉdonoj estas unu duono da membroj.

## Artikolo 9

### ALDONA REGULARO

9.1 Ĉiuj decidoj de la Ĝenerala Asembleo aŭ de la Estraro kiuj kompletigos, konkretigos aŭ klarigos ĉi-tiun Statuton estos aldonataj al ĝi kiel Aldona Regularo kun indiko de la organo kiu ilin decidis kaj la dato.

9.2 Ĉiuj intertempaj duboj aŭ mankoj de ĉi tiu statuto estos solvataj per konsulto de la Tria Libro de la Civila Kodo de la kataluna Princlando, pri juraj personoj, en la mezuro ke ĝi ne malakordas kun la statuto de ILEI.